



# PENSEO

N-ro 166

Aŭg./2005

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro <http://www.elperno.net/penseo.htm>

## ORIENTO-OKCIDENTO: NOKTO

### ALVOKO AL NOKTO

Jules SUPERVIELLE

(elĉerpaĵoj)

Tago ĉiam grimpas al suprenda dekliv',  
Vi faladas en ni, kun neniam finviv',

.....

Vi logas nin, al profundec' kultivas nin.  
Morto vi ne estas, sed en mallum' atend'.  
Nigrec' vi ne estas : steloj kompasas vin.  
Homa, fratino nia, flua, ĉirkaŭa.

.....

Ĝi alfafas nin per rokoj el silent'.  
Kaj subite ni plivastigataj, plikavigitaj per  
demandoj,  
Iom ŝanceliĝante, ĉiam revebriaĵ,

.....

Kiel ni en malhel' glimas, kiel esperon flegas  
Finveni al l'vasta kor' forkaŝa kie nigras.

.....

Ni aŭdadas en malproksim' petegon  
Provantan limiĝi senfandan angoron.

.....

esperantigis el la franca Roland PLATTEAU

### LUNNOKTO

EICHENDORFF

Ŝajnis, ke silente ĉiel'  
kison al ter' donis,  
ke ŝi meze bril' de l'floroj  
ĉiam revos de li.  
Tra kamp' milde spiris aer',  
grenoj balanciĝis,  
arbaroj sub kares' tremis  
de l'sternklarega nokt'.  
Kaj anim' mia nun streĉis

flugilojn siajn vaste  
kaj flugis tra kampar' silente  
kiel al l'lando naska.

Esperantigis el la germana R. Platteau

### Fruktokorbo

(poemo n-ro 20)

Rabindranath Tagore

Nokto ! vualita nokto!  
Estu mi via poet'!  
Kelkaj staris mute en ombro via dum jarcentoj  
Ho lasu, ke per mi rivelatus ties kantoj.  
Sur vetur' via sen rad' silente  
Kunprenu min mond'-al-monde migrante  
En tempopalac' vi reĝin'  
Raveglora kaj senlumin'  
Multe da demandsopira spirit' kaŝe  
En vian korton enŝteliĝis silente  
Tra senluma domo via esplorante  
Respondon petante vagis paŝ-postpaŝe.

.....

Estigu min, nokto ! ilian poeton ;  
Mi poetu vian senfandan silenton.



esperantigis el la bengala R. Platteau

### Bonaŭgura Songô

Ebudano

Ĉio en la mondo estis ankoraŭ vualita  
de obskura mallumo, tamen la edzo  
jam vekigis delonge kaj neniel povis  
reendormiĝi. Ne plu povante elteni sian  
silentadon, li ekvokis sian edzinon kun

puŝo: "Vekiĝu, vekigu do." La edzino sin turnis kaj neklare grumblis: "Estas ankoraŭ frue. Kion vi kriaĉas? Mi dormemas morte. Lasu min dormi kviete." Sed la edzo ne volis cedi. Li ŝovis la manon sub ŝian litkovrilon kaj ekpinĉis ŝin je la brako dum tiu ĉi volis endormiĝi denove: "Vekiĝu, vekigu, mi petas."

"Kio okazas?" La edzino ekkoleriĝis, pene malferminte la gluemajn palpebrojn, "Ĉu oni venas por dehaki vian hundkapon? Vi ne volas dormi, kaj ankaŭ ne lasas la aliajn dormi kviete. Vere damnde!" Furioziĝinte, ŝi pafis insultadon al li kvazaŭ maŝinpafilo.

"Ne koleru, ne koleru! Mi ĵus faris sonĝon tre strangan." La edzo pardonpetis kun humila tono.

"Ĉu vi sonĝis, ke diabloj venas por manĝi vian koron?" La edzino rompis liajn vortojn blasfeme, "Diru morgaŭ. Lasu min dormi plu momenton."

"Ne. Mi volas rakonti al vi ĝuste nun. Mi ne povas atendi ĝis morgaŭ." Insistis obstine la edzo.

"Kion vi sonĝis?" Vidante la obstinecon de sia edzo, la virino vole ne vole cedis.

"Mi sonĝis, ke pluvegas kaj okazas granda inundo. Ĉie estas akvo. Pro tio oni devas sintiriĝi sur tegmentoj aŭ sinkroĉi sur altaj arboj. Subite, Trezorulo, nia filo, falis en la akvon de la tegmento, kie ni staras. Povante trovi nenian metodon por savi lin, ni nur gape rigardis lin barakti vane en la akvo kun korŝira vekrio de malesperiĝo. Baldaŭ lin englutis la akvo. Dum nia dolora lamentado, io floris al ni. Ĝuste kiam ĝi floris preter nia tegmento, mi kaptis ĝin kaj trovis, ke ĝi estas nigra ĉerko. Scivole, ni tiris ĝin el la akvo

kaj malfermis la kovrilon. Ni ekvidis eksteratende, ke nia filo kuŝas morta en a ĉerko. Mia koro deŝiriĝis kaj mi ne plu povis deteni min de esplorigo. Je tio mi vekigiĝis. Vekiĝinte, mi neniel povis eltiri min de la imago, ke la sonĝo estas tre bonaŭgura. Vi scias ke laŭ la libroj pri sonĝoj, ĉiu el la akvo, ĉerko kaj mortinto aludas al la sonĝinto riĉaĵon, tamen mi vidis ilin tri unufoje. Ĉu vi havas kontraŭan opinionon?"

"Jes. Ankaŭ mi konsentas kun vi." Nun la edzino multe pli mildiĝis. Ŝi ja tre kredis je sonĝosignifoj. Eble ankaŭ ŝi ekscitiĝis de la bonaŭgura sonĝo far la edzo.

"Jes, granda riĉaĵo trafos nin!" La edzo ĝoje krietis, "Eble nia antaŭnokta decido portos al ni riĉaĵon. Ĉu vi ankoraŭ dubas pri nia decido?"

"Humm... Ne, ne plu. Ni agu laŭ via decido. Sed mi havas proponon. Ĉu ne nia filo dronis en via sonĝo? Eble li ja estas la alportanto de la riĉaĵo. Do ni lasu lin eltiri la loteriajn biletojn. Ĉu vi konsentas?" Sugestis la edzino.

"Jes, ankaŭ mi tiel opinias." Konsentis la edzo, "Ne aliaj, nur tia decido. Morgaŭ ja estos dimanĉo. Nia filo ne vizitos lernejon. Tio ja estos oportuna por li iri. Sed ĉu vi certas, ke li povos tion fari?" ekdubis la edzo.

"Kial ne? Li ja proksimiĝos al dudek jaroj, kaj lernas en la lasta jaro de la supera mezlernejo. Ĉu li ne kapablas tion fari? Estu trankvila!" La edzo diris decideme kaj senhezite, "Kaj krome, plej bone mi iru kun li. Vi sola restu en la hejmo por gardi la Mamonon, ĉu bone? La sonĝon ja faris vi, do vi devu resti hejme por daŭrigi la kulton al Li. Tiel Li certe volontos beni nin!"

"Jes, mi agu laŭ via decido." Post momenta medito, la edzo konsentis.

"Nu ni denove endormiĝu. Ni laboradas tuttage kaj vere bezonas bonan ripozon." Dirante, la edzino sin turnis for de la edzo kaj baldaŭ ekronketis nehasteme. Sed tamen, la edzo refoje eksuferis de la sendormeco. Diversaj pensfadenoj sin obscedis tumulte en lia cerbo, kaj li neniel kapablis reteni sin de sencela pensaĉado. Subite, venis al li bona ideo, ke li eknombri por kvietigi sian cerbon. "Unu, du, tri... cent, cent unu... mil... dekmil..." Bedaŭrinde tio ne helpis. Li jam nombris ĝis dek mil, tamen en lia cerbo ankoraŭ sonis zumado. Povante fari nenion kontraŭ tio, li do devis forrezigni la antaŭan esperon kaj lasis cedeme la pasintan travivaĵon speguli antaŭ liaj okuloj.

Li estis denaska kamparano honesta kaj neklerita. Kvankam li sin kaĝigis en la kampoj preskaŭ tutajn jarojn, tamen lia enspezo nur sufiĉis por vivteni la tri buŝojn kaj subteni sian filon lerni en lernejo. Dank' al la politika malfermiĝo kaj permeso, ke oni povu sin riĉigi per ĉia laŭleĝa metodo, multaj kamparanoj riĉiĝis ĉi lastajn jarojn. Sorĉate de tio, li prunteprenis 1500 juanojn el banko kaj fondis porkejon, sed pro manko de tekniko, neatendita plago trafis lian porkejon kaj ĉiuj porkidoj mortis dum duonmonato. Pro tio, li suferis perdon de mil janoj. Tio ja vere estis fatalaĵo al li. Kiel li redonu la ŝuldon en la banko? Por likvidi sian ŝuldon, li devis trovi alian rimedon por enspezigi sin. Li aŭdis ke varoj en Shijiazhuang estas multe pli malkara ol en lia hejmloko, kaj multaj homoj sin profitigis per tia komerco. Do li decidis ankaŭ sin okupi pri tio en libertempo post prizorgado de siaj kampoj. Kun la restaj 500 juanoj

en poŝo ĉe sia brusto, li veturis sola al la urbo Shijiazhuang por pruvi sian fortunon. Atinginte la cellokon, li tuj pravigis la informon, kaj ekmemfidiĝis pri la ĉifoja adventuro. Timante, ke oni impostis lin, li ne aŭdacas aĉeti en magazeto. Li aĉetis pakon da vestoj ĉe staplo en nehela angulo de iu strato kaj ŝtele glitis hejmen. Sed atinginte hejmen, li trovis kun indigno kaj malĝojo, ke en la pako la veraj vestoj ankoraŭ ne atingis trionon de liaj aĉetitaĵoj. La ceteraj estis nur eluzitaj tolpecoj. Englutinte sian koleron, li devis forvendi tion je tre malalta prezo. Pro tio, li perdis preskaŭ ĉiun restan sumon. Tio korsuferigis lin tiel, ke li kuŝis duonmonaton ne dormi kaj manĝi bone.

Antaŭ nelonge, li prunte kolektis 1500 juanojn kun granda malfacilo el siaj parencoj kaj amikoj por redoni la bankon. Ĝuste tiam, oni publikigis anoncon, ke por stimuli la mondeponemon de homoj, la Gubernia Banko decidis vendi loteriajn biletojn ĉiu kun valoro de tridek juanoj. La monon por la biletoj oni deponigis senintereze en la banko tri jarojn. Tamen se iu estas bonfortuna, li ja povus eltiri por si koloran televidon, biciklon, lavmaŝinon kaj aliajn valorajn objektojn. La iom malpli bonfortunaj povus eltiri litkovrilon, veston, mantukon, lesivon kaj aliajn vivbezonaĵojn. Maljunulo en lia vilaĝo nur aĉetis du biletojn, sed hazarde eltiris koloran televidon kun valoro de iom malpli ol 2000 juanojn. Tio vekis grandan sensacion en lia vilaĝo kaj la ĉirkaŭaj. Oni svarmis al la bazarloko por provi sian fortunon, kaj ne malmultaj profitigis sin. Vidante tion, ankaŭ li ektamburetis en sia koro. Li

